

Flandra ESPERANTISTO

TIJDSCHRIFT VOOR ESPERANTO - ONDERWIJS EN - PROPAGANDA

Verschiĝnt maandelijks
Achtthende jaargang
Nummer 6 (200)
JUNI 1951

Vertegenwoordiger in Nederland:
LEEN
sekr. Stadionkade 6, Amsterdam Z.
postrek. 34563 van P. M. Mabeoone
Pythagorasstr. 122, Amsterdam O.

Orgaan van de
VLAAMSE ESPERANTISTENBOND
POSTBUS 342, BRUSSEL
Postrekening 2321.50 van V. E. B.

LIDGELDEN:
* Leden: 75 fr.
* Steunleden: min. 150 fr.
Inwonende leden: 25 fr.
(* met bondsorgaan)

ABONNEMENTEN:
België: 60 fr.
Ceteraj landoj: 75 bfr.
Proefn.: 5 fr. (1 r.k.)

NIA KONGRESO

Kiam ni sabatmatene kun kofroj, pez-pezaj pro la spirita nutraĵo, kiun ili enhavis, atingis la kongresejon, regis tie la kutima aktiveco, ĉiufoje antaŭanta Esperanto-kongreson. Fervoraj L.K.K.-anoj pendigis flagojn kaj pretigis la akceptejon, kaj infektite de ilia energio ni, konkerinte malgraŭ malafabla bojado de kelkaj ribelemaj kelneroj kelkajn tablojn, rapide aranĝis la libro-standon kaj elkofrigis niajn trezorojn. Kvankam nur je la 13.30 h. la akceptejo oficiale malfermiĝis, jam je tagmezo la unuaj kongresanoj invadis la salondon kaj baldaŭ aperis la unuaj klientoj, kiuj avide forŝiris el niaj manoj „Retoriko“ de prof. I. Lapenna. Iom post iom la florumamita salono pleniĝis, dise sidis kongresanoj, admirantaj la kongresdokumentojn kaj pristudentaj la vojon kiun ili devis iri por atingi siajn tranoktojn. Duonon post la tria s-ro Mabeoone, prezidanto de L.K.K. oficiale malfermis la kongreson. Gojiga estas laŭ li la fakto, ke pluraj lokaj eminentuloj bonvolis aliĝi al la honora komitato; gojige ankaŭ, ke ĉi tiu unua „Benelux“-kongreso okazas en la urbo kie la nederlanda pioniro Dreves Uitterdijk antaŭ 50 jaroj komencis sian agadon. A parte li bonvenigis la gazetraportistojn kaj esprimis la deziron, ke la gazetaro estonte pli serioze ol ĝis nun atentis nian celadon. Honore al la eksterlandaj kongresanoj aŭdigis la naciajn himnojn. Salutis la kongreson s-ro Lehman, reprezentanto de la loka sekcio de F.L.E., s-ro De Jong, prezidanto de N.K., s-ro Van Hest, reprezentanto de la loka sekcio de N.K., s-ro Holmes, prezidanto de Londona Esperanto-Klubo, s-ro P. Korte, delegito de N.G.G.E. kaj s-ro Jung Jr., transdonanta la salutojn de sia patro. S-ro Mabeoone voĉlegis salutojn de s-ro Goldsmith, la ĝen. sekr. de U.E.A., de la Brita Esperanto-Kongreso, Sveda Esperanto-Federacio, Centra Dana Esperantista Ligo, Germana Esperanto-Asocio, K.U. N.E., la direkto de Germanaj Federaciaj Fervojoj kaj la Esperanto-grupo el Bingen. Sekvis mallonga parolado de s-ro Debrouwere, la prezidanto de F.L.L.E., kiu esprimis sian gojon pri la kongresa kunlaboro inter la „Benelux“-landoj kaj de s-ro Blokker, la prezidanto de L.E.E.N. Post kelkaj informoj la oficiala malfermo apartenis al la pasinteco. La kongresejo malpleniĝis kaj ankaŭ ni kune kun la ĵus alvenintaj flandroj kaptis la okazon ĉeesti la oficialan akcepton en la belega urbdomo. La urbestro, s-ro mag. J. A. G. M. Hellenberg Hubar atentigis pri la duobla celo de la esperantistoj, la praktika, konsistanta en akceptigo de nia internacia lingvo kiel helplingvo por internaciaj rilatoj kaj la ideo, celanta interfratiĝon de diversnaciaj. El ĉiuj mondlingvaj projektoj nur Esperanto estas praktike uzata kaj la nombro da esperantistoj daŭre kreskas. Li esprimis sian gojon pri la elekto de Hilversum kiel kongresurbo, ĉar en „radio-urbo“ oni ja havas ĝustan ideon pri internaciaj kontaktoj. La verda koloro de la esperantistoj abundas en la „ĝardenurbo“ Hilversum. Nome de la komunumestraro li deziris sukceson al nia kongreso kaj agrablan restadon en Hilversum. S-ro H. J. Blokker dankis pro la simpatia akcepto kiu klare pruvis, ke la komunumestraro plene komprenas nian celadon. Vere, ni ne estas tiaj idealistoj, kiuj kredas, ke Esperanto sola alportos la mondpacon! Same kiel la radio en Hilversum la esperantistaro bezonas fiksan ondlongon, nome bonan organizon kaj perfekte funkciantan sistemon de delegitoj. Pro la fakto ke ĝuste antaŭ 50 jaroj la nederlanda pioniro Dreves Uitterdijk komencis en Hilversum sian agadon, li sugestis al la komunumestraro honori tiun pioniron, nomante iun aleon „Dreves Uitterdijklaan“. La esperantistoj povas fieri pri tio kion ili atingis, ĉar la rezultatojn ili akiris per propraj modestaj rimedoj kaj ne per ŝtataj subvencioj. La finan venkon tamen ni povos atingi nur kiam Esperanto estos oficiale enkondukita en la lernejojn. Post la oficiala akcepto la urbestro dum kelka tempo amike interparolis



Oficiala malfermo de la Esperanto-Benelux-Kongreso en Hotelo „Santbergen“, Hilversum. S-ro P. M. Mabeoone, la prezidanto de L.K.K. faras sian malferman paroladon. Malantaŭ la „grava“ tablo sidas f-ino S. Visser, la sekretariino de L.K.K. kaj s-roj Blokker kaj Debrouwere, prezidantoj resp. de L.E.E.N. kaj F.L.L.E. La kliŝon afable disponigis N.V. Dagblad „De Gooi- en Eemlander“, Hilversum.

kun s-ro Blokker kaj s-ro Roose, reprezentanto de F.L.L.E. kaj la kongresanoj havis la okazon konvinki sin pri la bona kvalito de la alkoholaj kaj tabakaj proponitaj de la gastama komunumestraro. Poste, ĉar la apetito estis tiklita de la bongusta „oficiala“ aperitivo, oni serĉis restoracion por kontentigi siajn materiajn dezirojn. Devokoscias ni terapidis al la kongresejo, survoje aĉetinte fiŝojn kaj frititajn terpomojn kaj alveninte en la kongresejo ni jam baldaŭ konstatis, ke terpoj frititaj estas frandaĵo ŝatata ne nur de flandroj. Tro malfrue (en Esperanto-kongresoj oni ŝajne ĉiam malfruas) la kurteno levigis por doni al la geaktoroj el Brugge la okazon pruvi siajn talentojn per prezentado de harstariga murdo, kiu okazis en pensiono, ie en Hilversum. Eble ne por ĉiuj, speciale ne por komencantoj, la prezentado de triakta la tutan vesperon pleniganta teatraĵo estis alloga programero, sed la geaktoroj bone sciis siajn rolojn kaj la plimulto eĉ sciis superbrui la moviĝemajn kongresanojn el kiuj pluraj — bedaŭrinde dum la prezentado — uzis la malantaŭan parton de la salono kiel promenejon kaj konversaciejon. Helpe de la kongresanoj el kiuj tri ricevis valoran donacon rekompence por siaj detektivaj talentoj, policinspektoro F. Roose sukcesis senvaligi la misteron kaj aresti la murdistinon de f-ino Rousseau, kiu mem pro tro baldaŭa kadavriĝo ne havis okazon montri siajn talentojn. Poste la verdsteluloj disigis por migri al siaj respektivaj tranoktejoj. Survoje ni renkontis s-ron Appel, kies klopodoj havigi al si tegmenton super la kapo, ĝis tiam plene fiaskis. La kompatindulo jam vespere malsaniĝis kaj devis dimanĉmatene revojaĝi hejmen.

La sekvan matenon okazis protestanta kaj katolika diservoj. Simpatie impresis artikolo pri nia kongreso en „De Klop“, organo de sekcio Hilversum de Ned. Protestantenbond, kiun verkis pastro J. C. Fischer, ano de la kongresa honorkomitato. Je la 10.00 h. komenciĝis la jarkunveno, pri kiuj ni aliloke en ĉi tiu gazeto detale raportas. S-ro J. Pouli salutis la kunvenon kiel reprezentanto de la ĉefestraro de F.L.E. Je la 12.15 h. okazis fotografiĝo antaŭ la kongresejo. La brava fotografo, sufiĉe provinca de la paciencon de la kongresanoj, nur per lastmomenta rapida forkuro el inter la mallevigantaj barieroj, evitis tro fruan morton. Post abunda lunĉo s-ro H. Vermuyten, jam laŭnome konata de ĉiuj pro siaj poemtradukoj en nia gazeto, revivigis al ni post mallonga enkonduko la mezepokan ses jarcentojn aĝan „Beatrijs“, de kiu li deklamis grandan parton en bonega Esperanto-traduko. Troa simpatio de la ĝenerala

L.E.E.N.-kasisto al A.V.R.O. kaŭzis prekaŭ fatalan malpleniĝon de la salono, sed feliĉe la delegitoj restis sur posteno por partopreni la liberan diskutadon. Post la kunveno la klientoj amasiĝis ĉirkaŭ nia librobudo kaj en tiaj momentoj ni klare konsciis pri tio, ke homo havante nur du manojn, per kiuj li devas samtempe enkasigi kaj redoni monerojn, noti vendojn kaj mendojn kaj transdoni librojn, ne estas perfekta kreitaĵo. Okaze de la tagmanĝo la flandroj per kantado kaj eleganta svingigado montris sian kontentecon, ĉu pri la kongreso, ĉu pri la bongustaj manĝaĵoj, ĉu pri ambaŭ. Honore al la nederlandanoj ĥoro sub gvido de s-ro Roose kantis „Hup Holland, hup, laat de leeuw niet in z'n hempie staan“ (klarigo por eksterlandaj legantoj: ĝi ne estas la oficiala nederlanda himno!) kaj Sibo de Jong - honoresaluton al ĉiuj multe kontribuis al agrabla „etoso“, lerte manipulante sian akordionon. Post rapida aliaranĝo de la seĝoj komenciĝis varia festprogramo al kiu kontribuis kantantaj kukoloj, geaktoroj de sekcio Hilversum, kiuj prezentis gaje finigantan tragedieton „La plej bela tago“, baledgrupo de f-ino Vennekool, s-ino Albers, kiu en groningena kostumo instruis la kongreskanton kaj s-ro Boeda, kiu per siaj jonglaĵoj mirigis ne nur siajn viktimojn, el kiuj amiko Cortvriendt per originalaj flandraj ĝojkrioj estis akklamata de sia sekvantaro, sed ankaŭ ĉiujn aliajn kongresanojn. Poste oni „balis“ ĝis malfrue en la nokto.

Londonmatene aŭtobusoj veturigis la kongresanojn tra la bela „Gooi“. Preter Naarden-Bussum, la lagoj de Ankeveen kaj Loosdrecht oni fine atingis Zeist, kie kelkaj lokaj esperantistoj bonvenigis la ekskursantojn kaj kie okazis komuna lunĉo en hotelo Boschlust. Posttagmeze oni reveturis preter Soesterberg al Hilversum kaj proksimume je la 15.30 h. lastfoje aŭdigis la kongreskanto. Post adiaŭa vorto de la prezidanto de L.E.E.N., s-ro Blokker, ankorau unufoje eksonis „La Espero“, kaj... finiĝis la unua Benelux-kongreso, kiu bonege sukcesis, kvankam la programo ne estis kompleta (s-ro N. Wolters ja ne havis „sian“ aventuron). La sukceson ni dankas ne nur al la bona organizo de L.K.K. kun ĝia aktiva sekretariino f-ino Suus Visser, al kiu la kongresanaro ŝuldas multan dankon, sed ankaŭ al la gaja humoro de la kongresanoj kaj la sufiĉe bona vetero. Pluraj gazetoj, i.a. „Gooi en Eembode“, „Het Vrije Volk“ kaj „Gooi en Omme-land“ favore raportis pri la kongreso. La lasta krome publikigis foton pri la oficiala malfermo. Dank' al la agemo de iu LEEN-ano eĉ aperis sufiĉe detala raporto en „Sneeker Nieuwsblad“.

A. K. kaj G. T.

Wereldnieuws

De heer Ir J. R. G. Isbrücker, voorzitter van de „Akademio de Esperanto“ heeft aan verschillende van zijn leerboeken op electrotechnisch gebied een zakenregister toegevoegd met vertalingen in het Engels en Esperanto.

Het decreet van Augustus 1948, waarbij de Esperanto-beweging in Portugal verboden werd, is bij ministerieel besluit van 12 April 1951 vernietigd.

In Denemarken is het eerste nummer verschenen van „La Studento“, internationaal orgaan voor studenten en academici.

Van de 24 Esperanto-cursussen die in de afgelopen winter in Kopenhagen werden gegeven, werden 21 van staats- of gemeentewege bekostigd.

In Uruguay verscheen een uitstekende vertaling van „Ariel“ van de schrijver J. E. Rodó; het eerste literaire werk in Esperanto, dat in dat land is gepubliceerd.

In de volkshogeschool Hustedt bij Celle (Neder-saksen) werd van 26 Maart tot 2 April een speciale Esperanto-cursus voor onderwijzers gegeven.

De laatste tijd zijn weer verschillende toeristische folders in Esperanto verschenen, o.a. van Brugge, Spa, Bonn, Bamberg, Konstanz en het Como-meer.

Op 11 Maart werd in Peking de Chinese Esperanto-Bond opgericht. Twintig vooraanstaande geleerden tekenden een manifest, waarin zij verklaarden Esperanto als taal voor de wetenschap te zullen gebruiken in verschillende door hen te publiceren werken.

Gedurende 5 uren per week wordt Esperanto als verplicht leervak onderwezen in het vijfde leerjaar aan de volksschool St. Marien te Bonn.

CU BEN-EL-LUKSA KONGRESO ?

(fantaziaj raporteraj)

Ĉi Beneluks-kongreso ne estis ben'el lukso, sed el komplez' sukceso! Kompare kun la nukso-dormiga estis grajno, vigliga estis ŝelo: entute do - nur gajno! Rigidaj pro l' amelo de verva diskutado, distradis nin plensate teatra prezentado dimanĉe post sabate. Sinjoro Mabeoone gvidadis fortatone, sed fuŝis akustiko: do estis ne paniko, Dum oni ja predikis la varmo fie strikis; varmigis nur dancado en ej' kaj... sur estrado. Fotografado spritis: ĝi la kongreson splitis, sed tiun rekunigis manĝado, kiu ligis, ĉar regis mildaj sentoj dum la labor' per dentoj. Dum iu grav-prelegis, ni la digeston flegis. Veturis kun sandviĉoj ni tra l' Gojlandaj riĉoj, kaj fine laŭprograme disiris ni tamtame. Kaj tamen, tamen ben' el luksa spirito daŭre kun ni restas, ĉar nun - al ideal' obstrukca - la mond' nur pri mizer' atestas. Spirit' de tiu luksa beno konduku nin al Antverpeno!

TYNEVERUM.

Pasis Pentekosto kaj kun ĝi nia unua „Benelux“-kongreso. Ni volas danki la kongresanaron, kiu bonvole konsentis pri la ofte simplaj tranoktejoj, tiel montrante vere esperantistan komprenon pri la malfacilaĵoj, kiuj tiurilate ekzistis por ni. Finiĝis la unua; vivu la dua „Benelux-kongreso“!

Ĝis la revido en Antwerpen!

L.K.K.

DE TALENCHAOS

In het voorwoord van „Lexicon van het Moderne Amerikaans” van John Vandenberg zegt de schrijver o.a.: „Meer mensen spreken Amerikaans dan Engels... maar aan dat Amerikaans wordt bitter weinig aandacht geschonken”.

In „Het Schoolblad” van 28-IV-'51 lezen we verder: „... Het zijn deze en dergelijke woorden en uitdrukkingen, die het grote verschil aangeven tussen Amerikaans en Engels. Die zijn het, die maken, dat een Amerikaan veel moeite heeft met het verstaan van een Engelsman.”

Wanneer zal deze modernste moderne taal zijn inrede doen als leervak op U.L.O.- en middelbare scholen? Een taal méér, wat maakt dat uit? In het talenveen kijkt men niet op een turkje...

Volgens televisie-ingenieur dr Allan Damont zullen de programma's der buitenlandse televisiestations in Amerika over tien jaar kunnen worden gezien. Hij raadt de Amerikaanse televisie-bezitters aan, hun talenkennis alvast wat op te frissen.

We vernemen nader, dat exploitanten van allerlei taleninstituten reeds geld bijeenbrengen voor de oprichting van een standbeeld voor de Heer Damont...

La frato de Pik.

NI, ESPERANTISTOJ
KAJ... LA MILITO

Ekde sia deveno, la Esperanto-movado batalis por la Paco. Tiu tenigo neniel perdis sian gravecon. Kredible estus eĉ dezirinde ĉiam bruatigi kaj la gravecon kaj la tenigon!

Nu, ni esploru jenajn statistikojn kaj nombrojn, kiujn atingis la statistikisto Parish, koncerne la pasintan mondmiton.

Giaj kostoj ebligis jenan distribuon: al ĉiu familio de Usono, Kanado, Aŭstralujo, Anglujo, Francujo, Germanujo kaj USSR, domo de 5000.000 b.fr. kun meblaro valoranta 225.000 b.fr. kaj kapitalo en mono de 1.000.000 b.fr.; al ĉiu el ĉiuj urboj de pli ol 200.000 loĝantoj, unu miliardo por la konstruado de bibliotekoj, unu miliardo por la lernejoj kaj la sama sumo por la hospitaloj... Ĉu necesas komentario?!

Kaj, en ĉi tiu supervido, oni neglektis (la ne neglektendan) sennoman suferadon de 20 milionoj da mortintoj, kaj de la sennombraj aliaj, kiuj iel estis skurgataj!

INTERNACIA
JUNULARKUNVENO

Tuj post la Universala Kongreso en München la junaj kongresanoj kunvenos en junulargastejo ĉe la bordo de Walchensee dum tuta semajno. Aŭtobusa ekskurso okazos al Garmisch, Oberammergau, Ettal, Linderhof. Inkluzive de la vojaĝo de kaj al München, loĝado, manĝoj kaj ĉiuj ceteraj aranĝoj vi pagos ĝis 1-a de julio nur 43 markojn, post tiu dato 48 markojn.

Informojn donas Internacia Junular-Kunveno, Engelbertstr. 7, München-Pasing.

FRATO W. VAN ZON

Frato Wigb. van Zon, la 82-jara nestoro de la ekzamena komitato, ĉi printempe tre grave malsanis kaj estis operaciata en 's Bosch. Felice li jam tiom resaniĝis ke li denove biciklas! Gratulon al li pro lia resaniĝo!

V.A.B.-WEGENKAART 1951

De V.A.B.-wegenkaart 1951 is verschenen. Deze tweede uitgave, tegenover die van het vorig jaar aanzienlijk vermeerderd en verbeterd wat de wegen en hun toestand betreft, werd weer uitgevoerd in tweekleurendruk, op 100 x 65 cm, maar veel handiger gevouwen.

Ze licht in over de toestand van al de wegen voor motorvoertuigen, die de gemeenten van België, het Groothertogdom en deze der grensgewesten in Nederland, Duitsland en Frankrijk verbinden. De hoofdwegen worden van de andere onderscheiden en de afstanden tussen de gemeenten en belangrijke kruispunten werden gekwoteerd.

Tenslotte verhoogt een uitgebreide afstandstabel het nut van deze V.A.B.-uitgave, die slechts 7 fr 50 kost en in de V.T.B.-boekhandels te Antwerpen, Brugge, Brussel en Gent verkrijgbaar is. Schriftelijke bestellingen worden uitgevoerd na ontvangst van het bedrag op girorekening 324.558 van de Vlaamse Automobilistenbond, Sint-Jakobsmarkt 45, Antwerpen.

Let wel! Alle leden van de V.A.B. ontvangen deze kaart kosteloos over de post vanaf 1 Mei.

LA STUDANTO

Uitwerking van de opgaven in het vorige nummer:

Kara amiko,

Tutkore mi dankas vin pro via bela poŝtkarto ilustrita, kiun mi la pasintan semajnon ricevis, kaj kiu montras klare la grandegan amplekson de via urbo. Volonte mi regule korespondos kun vi en Esperanto pri diversaj temoj. Ĉu vi studis longan tempon? Mi partoprenis elementan kurson dum ses monatoj kaj sendube faras ankoraŭ multajn erarojn, sed lernante oni lernas fari, ĉu ne? Mi ankoraŭ ne parolas flue, sed post kelkaj tagoj mi vizitos la kongreson de F.L.L.E. kaj L.E.E.N. por ekzerci min en la konversacio. Ĉi tiu karto montras kelkajn loĝantojn de la vilaĝo Volendam, kiuj portas ankoraŭ siajn tipajn naciajn kostumojn. Esperante ke vi baldaŭ denove sendos al mi belan karton, mi samideane salutas vin.

1. En nia urbo staras domo, kiu estas pli alta ol la turo de ĉi tiu preĝejo.
2. Trans la rivero staras ligna domo en kiu loĝas malriĉa vidvino kun siaj tri infanoj.
3. Se mi estus tiel malsana, mi konsultus kuraciston.
4. Nia servistino aĉetis ĉe la buĉisto tri funtojn da porkaĵo.
5. Ni ĝuste estis eksidontaj, kiam oni sonorigis.

wegen; snijbloemen; dat kan geen kwaad; het regent dat het giet.

Neorganizita striko; laŭ plimulto da voĉoj; miraklo inter mirakloj!; ĉiu birdo kantas laŭ sia beko; pli kara estas kapo ol ĉapo; antaŭ tagiĝo; droni en ŝuldoj; tio superas mian komprenon; manvoki kelneron; eltordi citronon; ŝanĝkonstruo; nutri suspekton; plengorge krii.

PREFIKSE UZATAJ PREPOZICIOJ

La prepozicioj, prefikse uzataj povas kelkfoje kaŭzi malfacilaĵojn, nome se ili ne estas proprasence uzataj.

Al kelkfoje povas signifi „laŭ”, ekz. *altranĉi, aljustigi, alfari*.

El povas signifi „akiri (kvazaŭ eligi el iu) ion deziratan”, ekz. *elflati* monon de iu. En tiu senco oni ankaŭ uzas „per”, ekz. *perlabori, permiliti, perforti*; kelkfoje el signifas „plene, elĉerpe, ĝisfine”, ekz. *ellerni, elturmenti, elpigi, elteni*.

Inter povas signifi „inter si”, „reciproke”, ekz. *intersanĝi, interligi, sin interbati, interkomunikigi*.

Por kelkfoje signifas „favore al”, ekz. *porparoli* (= pledi), *porpeti*. En tiu senco oni ankaŭ uzas *pro*.

Sub povas signifi „kaŝe, spione, sekrete”, ekz. *subaŭskulti, subridi, subri-*

KOMUNIKOJ DE LA LIBRO-SERVOJ.

	Gld.	Belg. Fr.
<i>Kredu min, sinjorino!</i> , de C. Rossetti (bind.)	5,40	73,—
<i>Miru-Pensu-Ridu</i> , de P. Bennemann (bind.) (neelĉerpebla kolekto da artikoloj, enigmoj, serĉoj, k.t.p. por la konversaciaj vesperoj)	5,40	73,—
<i>Fundamenta Krestomatio</i> , de L. Zamenhof	5,20	72,—
<i>Fundamenta Krestomatio</i> , de Zamenhof: kelkaj uzitaj sed bonaspektaĵaj ekzempleroj (bind.)	3,95	—
<i>Gösta Berling</i> , de S. Lagerlof (broŝ.)	4,80	66,—
<i>Pro Istar</i> , de H. A. Luyken (bind.)	4,50	61,—
<i>La mondo ne havas atendon</i> , de M. Dekker	2,50	—
<i>Tra la labirinto de la gramatiko</i> , de F. Faulhaber	5,90	85,—
<i>Plena Vortaro</i>	11,50	175,—
<i>Vortoj kaj Esprimoj</i> , de C. B. Zondervan	1,15	—
<i>La nevenkebla ĝeno</i> , de T. Thijssen (bind.)	4,90	67,—
<i>10 leterpapiroj kun kovertoj kun surskribo: „Esperanto, lingvo internacia”</i>	0,50	—
<i>Kongresparoladoj de L. Zamenhof, kun resumo pri la historio de Esperanto</i>	0,45	—
<i>Emajlitaj pordoŝildoj kun verda stelo kaj surskribo: „Esperanto parolata”</i>	0,75	—
<i>Insignoj:</i>		
rondaj 5 mm, verda stelo sur blanka fono, (pinglo)	—	10,—
rondaj 12 mm, verda stelo sur blanka fono (butono aŭ broĉo)	—	12,—
stelforma, verda stelo kun blanka rando kaj orumita E. (butono aŭ broĉo)	—	13,—
pentagonforma, verda stelo sur blanka fono kaj orumita E. (butono aŭ broĉo)	—	13,—
diversaj-glumarkoj (rondaj, kvadrataj, steloj) 100 ekz.	—	6,—

MENDU ĈE

Boekendienst L.E.E.N., Z.O.-singel 5, Bergen op Zoom, (giro 76915)
Vlaams Esperanto-Instituut, Blankenberge steenweg 72, Brugge (p.c.r. 3268.51)

Iu aŭtomobilfabrikisto (aŭtomobilfabrikanto) publikigis (anoncis), ke en lia fabriko oni sukcesis munti (kunmeti) unu aŭtomobilon (veturilon) en sesdek ses minutoj. La sekv(int)an matenon lin telefone alvokis iu, kiu demandis, ĉu tio estas efektive vera. „Certe” (efektive), fiere diris la fabrikisto, „sed kial vi demandas tion?” „Ho, nenial”, diris la alia, „sed mi supozas, ke mi hazarde aĉetis (ekhavis) tiun aŭtomobilon”.

Anstataŭigu la streketojn per la gustaj partcipaj finaĵoj:

1. Sid — en la kupeo mi rigardis al la preterflug — pejzaĝoj kaj al la herbejoj, sur kiuj staris bovinoj, dezir — esti melk —
2. Guste kiam mi estis raz — min, oni sonorigis, do mi kun duone sapum — vizago rapidis al la jus kolorig — pordo tra kies rompig — vitreto mi vidis la sonorig —
3. Per miaj pro la frosto rigidig — fingroj mi ne sukcesis levi la fal — argentum — medalon.
4. En la festotago promen — tra la urbo, mi vidis multajn fremdulojn, ven — ĉi tien por admir la bele ornam — fasadojn de la fortike konstru — domoj.
5. La knabeto estis plor — ĉar lia pilko estis krev —, sed la lin konsol — patrino iris kun li al nova antaŭ du tagoj malferm — butik por aĉeti por la plor — siajn larmojn jam sekig — knabeto novan pilkon.

Tracht de volgende uitdrukkingen te vertalen:

Droog weer; hij heeft zich verslapen; een Esperantist in hart en nieren; hij is kort van memorie; dat valt me mee!; ik ben komen lopen; tot en met de derde les; ieder was er vol van; hij werkt voor twee; na lang wikken en

gardi, subaĉeti, subkompreni (= kompreni sencon kaŝigantan sub la vortoj).

Vertaal:

1. Als leerboek is dit boek bruikbaar, als leesboek bevat het me niet.
2. De ziekte voelde zich weldra veel beter en na 'n paar weken oordeelde de dokter hem geheel hersteld.
3. Het is een verheugend feit, dat Esperanto zich meer en meer verspreidt over de gehele wereld.
4. Ik zou mij vervelen, als ik de hele dag niets te doen had. Voortdurend niets doen verveelt.
5. Wegens het slechte weer is de reis uitgesteld tot de volgende week. Laten we hopen, dat ze dan door kan gaan.
6. Niet alle vruchten zijn te eten, daarom is het raadzaam geen vruchten te eten, die men niet kent.
7. Door het steeds toenemen van het verkeer, moet men in grote steden dikwijls te smalle straten verbreden.
8. Het was beslist noodzakelijk, dat hij onverwijld het land verliet.
9. Hoewel mijn broer geschreven heeft, dat hij om tien uur zou komen, was hij er om drie uur nog niet.
10. De sergeant beval de soldaten hun geweer schoon te maken.

(A-examen Amsterdam-Leeuwarden 3-V-'51).

Uitwerkingen van Vlaamse cursisten voor 25 Juni aan V.E.B., Studanto, postbus 342, Brussel; van Nederlandse cursisten aan A.J. Kalma, Stadionkade 6, Amsterdam-Z.

Ĉu vi jam aliĝis al la someraj kursoj de F.L.L.E. kaj L.E.E.N., kiuj okazos 27-VII - 2-VIII en Soesterberg? Se ne, tuj aliĝu!

VERDLANDO VOKAS

Listo de radio-disaŭdigoj en aŭ pri Esperanto kaj informoj. Tempindiko laŭ MET (= mezeŭropa tempo) valida ankaŭ en Nederlando kaj Flandrujo.

Mallongigoj: I = informoj, P = parolad-(et)o, K = kurso, M = muziko.

Dimanĉe:

19.00-19.15 Sofio, 39,11 m: I.

Lunde:

8.15— 8.30 Stokholmo, 19,80 m, 49,46 m: I
8.45— 9.00 Rijssel (Lille), 235 m: P.
15.30—16.— Rio de Janeiro, 30,71 m, 375 m: K.

16.15—16.30 Stokholmo, 19,80 m, 27,83 m: I
23.15—23.20 Hilversum II, 298 m, VARA: I. (Nur ĉiudusemajne).

Marde:

2.15— 2.30 Stokholmo, 19,80 m, 27,83 m: I
12.55—13.00 Berno, 25,61 m, 16,87 m, 48,66 m: P. de d-ro Arthur Baur
18.35—18.40 Berno, 19,60 m, 25,61 m, 48,66 m: Ripeto de la tagmeza dissendo.

Merkrede:

0.30—0.45 Gvatemalo, 49 m: I.
18.20—18.40 Romo, 25,40 m, 31,35 m.
22.35—22.40 Vieno, 25,48 m, 513,7 m: I.

Ĵaŭde:

9.30—9.45 Parizo, 48,39 m, 347 m: K.
12.55—13.00 Berno, 25,61 m, 16,87 m, 48,66 m: P. de d-ro E. Privat.
18.35—18.40 Berno, 19,60 m, 25,61 m, 48,66 m: Ripeto de la tagmeza dissendo.
18.10—18.25 Vieno, 25 m, 30 m, 48 m, 203 m: P. (ĉiun duan ĵaŭdon).

Vendrede:

18.20—18.40 Romo, 25,40 m, 31,35 m.

Sabate:

21.00—21.15 Sofio, 39,11 m: I.
23.15—23.20 Hilversumo I, KRO, 402 m: I

Informojn pri Esperanto-radio-elsendoj sendu ne nur la radio-stacioj, sed ankaŭ la radio-aŭskultantoj al: S. S. de Jong Dzn, Radio-Servo N.C.K.E., Waltweg 3, Tjerkwerd (Fr.), Nederlando.

CURSUSLEIDERS

ontvangen op aanvraag een present-exemplaar van de leergang

Esperanto in twintig lessen

Hans Bakker. v. Tuyl v. Serooskerkenplein 33, Amsterdam Z

NIAJ SOMERAJ KURSOJ

Jam pli ol 50 gesamideanoj anoncis sin por la someraj kursoj, kiujn „La Estonto Estas Nia” kaj Flandra Ligo Esperantista okazigos de 27-VII ĝis 2-VIII en la konferenco de „Ned. Protestanten-Bond” en Soesterberg.

Okazos konversacia kurso gvidota de la konata bonhumorulo s-ro A. Weide (Germ.) por tiuj, kiuj trastudis elementan lernolibron kaj deziras plibonigi sian parolkapablon; krome literatura kurso gvidota de s-ro d-ro Th. van Gindertaelen (Belg.) kaj seminaria kurso, gvidota de s-ro mag. A. J. Kalma (Ned.)

Oni povas laŭplaĉe partopreni unu, du, aŭ ĉiujn tri kursojn. Estas planitaj kelkaj duontagaj ekskursoj kaj diversaj vesperaj aranĝoj (prelegoj, variaj programoj, k.t.p.).

Kurskotizo g. 36,— (inkluzive de ĉiuj manĝoj kaj tranoktado). Tuj ĉe aliĝo oni pagu g. 18,— (la flandroj bonvolu pagi al s-ro Th. v. Gindertaelen, Louisastr. 23, Mechelen) kaj la reston tuj post alveno en Soesterberg.

La malgrandaj ĉambretoj jam ĉiuj estas rezervitaj kaj restas loko nur por malmultaj gesamideanoj, do tiuj, kiuj ĉi somere ŝatas partopreni kaj esti en samideana rondo ne prokrastu sian aliĝon sed anoncu sin tuj!

Senpagan detalan prospekton volonte sendos al vi la administranto s-ro C. B. Zondervan, Sweelinckstraat 2, Deventer kaj la ĝen. sekr. de F.L.L.E. kaj L.E.E.N.

POR KORESPONDEMULOJ

Deziras korespondi pluraj ĉinoj; adreso: Sanhaja Esp-ista ligo, P.O. keso 636, Sjanghai, Ĉinujo, kaj f-ino Vlasta Jiraskova, Zizkova 325/61, 26-jara; f-ino Milada Martinu, Libusinka 8, 18-jara; f-ino Irena Stranska, Polska 3, 28-jara (kun kuracistoj kaj farmaciistoj) kaj s-ro Emil Sedlacek, n. Hraničar 10, 26-jara, ĉiuj en Trutnov, Ĉeĥoslovakujo.

S-ro R. Nardon, 54 bis Rue de Lancry, Paris (Francujo) deziras korespondi kun nederlandaj buĉistoj.

NED. ESPERANTISTEN-VEREN. „LA ESTONTO ESTAS NIA”

Alg. Secretariaat, schr. cursus voor beginners en uitleendienst:
Mr A. J. Kalma, Stadionkade 6, Amsterdam-Zuid, tel. 96160.
Penningm.: P. M. Mabesoone, Pythagorasstr. 122, Amsterdam-O. postrek. 34563.
Boekendienst, schr. cursus voor gevorderden en dipl. B: H Appel, Z.O.-singel 5, Bergen op Zoom, postrek. 76915.
Bibliotheek: E. A. Koot, Joh. de Meesterstraat 12, Utrecht.
Propaganda-dienst: H. Bakker, Van Tuylplein 33/1, Amsterdam-Zuid, tel. 95320.
Alg. Ned. Esp. Examen-comm.: Mej. H. M. Mulder, Zilvermeuwstr. 29, Badhoevedorp
Ceddel. U.E.A.: P. Moen, Schaarsbergenstraat 104, Den Haag, postrek. 79167.

KOMUNIKOJ DE LA ĈEFESTRARO

Por aŭtobusa karavano al Helsingör anoncis sin tro malmultaj personoj, do ĝi ne okazos. Tiuj, kiuj intencas vagonare vojaĝi al Helsingör povas ricevi detalan senpagan prospekton pri la tieaj someraj kursoj de s-ro P.M. Mabesoone, Pythagorasstraat 122, Amsterdam.

N.C.K.E.

Al Nederlanda Centra Komitato Esperantista aliĝis ne nur No So BE, sed ankaŭ A.N.S.E. (Asocio Nederlanda de Sciencaj Esperantistoj), do ĉiuj nederlandaj Esperanto-organizoj nun kunlaboras en N.C.K.E.

Pri la jubilea kongreso de F.L.E. kiu okazis je Pasko en Amsterdam, ni jam raportis en la Aprila numero.

K.U.N.E. okazigis sian jarkunvenon je 31-III en Utrecht. Parolis i.a. s-ro H. A. de Hoog pri la Esp.-ekzamenoj kaj s-ro L. Vasiljef el Kopenhago. Kiel reprezentanto de L.E.E.N. ĉestis s-ro Ch. Slijper.

La jarkunveno de N.K. okazis je 21 kaj 22-IV en 's Hertogenbosch. Pluraj gazetoj favore raportis.

No So BE (Nederlanda Societo de Blindaj Esperantistoj) havis sian jarkunvenon 19-V en Amsterdam. Kiel reprezentanto de L.E.E.N. ĉestis s-ro mag. A. J. Kalma; kiel reprezentanto de la loka L.E.E.N.-sekcio s-ro A. Lodema.

RAPORTO PRI LA JARKUNVENO

Je la 10.15 h. la prezidanto, s-ro H. J. Blokker, malfermas la kunvenon. Kvantam diskuto pri la temo „kiel plibonigi la ĝeneralan staton de nia asocio kaj de la sekcioj kaj kiel plifirmigi la kontakton?” okazos posttagmeze, li jam nun volas diri kelkajn vortojn pri tio. Pri entuziasmo atestas la fakto, ke el proks. 1500 membroj ĉestas 250, tamen la kresko ne estas konforma al tiu entuziasmo. La kaŭzo estas, ke tro multaj sekvas la malnovan sulkon kaj ne povas forlasi la malnovan pensmanieron. Oni diras, ke la malbonaj ekonomiaj cirkonstancoj malfavore influas la kreskon, sed nek en la tempo kiam Esperanto naskiĝis, nek en la tempo post la du mondmilitoj la cirkonstancoj estis favoraj kaj tamen la movado tiam kreskis. Precipe la junaj anoj entuziasmiĝu!

La ĝen. sekretario, s-ro A. J. Kalma, voĉlegas la nomojn de la sekcioj, reprezentitaj en la kongreso. Estas reprezentitaj 22 sekcioj kun entute 35 voĉoj.

La asocia jarraporto estas aprobata. S-ro P. W. Baas kompletigas la raporton pri la oficejo „Esperanto ĉe la Instruado” per kelkaj informoj, menciitaj sub rubriko „Mededelingen van het Bureau” en ĉi tiu numero. Lia propono sendi telegramon al la parlamento kun peto doni al la instruado de Esperanto leĝan bazon, estas aprobata. La prezidanto dankas la sekretariojn pro ties detala raporto.

La jarraportoj de la bibliotekisto, de la kontrola komisiono de la biblioteko kaj de la gvidantoj de la propaganda servo kaj teatra servo estas aprobataj. La prezidanto dankas la raportintojn pro ilia laboro.

Laŭ s-ro H. Arends (Arnhem) oni elspezis tro malmulte por propagandaj celoj; la budĝetita sumo estis pli alta. La ĝen. kasisto, s-ro P. M. Mabesoone, respondas, ke la koncerna sumo servas fakte nur por ekvilibrigi la budĝeton. Ankaŭ aliaj sumoj, menciitaj en la jarkonto enhavas elspezojn por propagandaj celoj.

La ĉefdelegito de U.E.A., s-ro P. Moen, voĉlegas sian jarraporton. Ĉar 50 malnovaj membroj ekzistas kaj 50 novaj gamsamideanoj aliĝis, la nombro da individuaj membroj restis la sama, nome 478, el kiuj 317 estas anoj de L.E.E.N. Ne temas finance pri elekto inter L.E.E.N. kaj U.E.A. sed pri la preteco oferi iom por nia idealo. Li apelacias al ĉies helpo, por ke la membronombro kresku ĝis super 500. U.E.A. siavice agas laŭpove; la jarlibro aperis jam en januaro kaj „Esperanto” estas belaspekta revuo kun interesa enhavo. S-ro P. W. Baas, komitatano de U.E.A. aldonas

kelkajn detalojn, kiuj tamen ĉefe rilatas al la periodo post 1-1-51. La ĉefa asocio ekzistas el U.E.A. sed feliĉe la hispana asocio realiĝis kaj la movado nun kreskas en tiu lando. U.E.A. faris kontrakton kun I.K.U.E. pri reciproka kunlaboro. Lia propono sendi leteron al s-ro E. Malmgren, prezidanto de U. E.A. por gratuli lin pro lia resaniĝo, estas aklame akceptata.

Pri punktoj 7a kaj 7b: „kritiko pri la gvidado de la ĉefestraro kaj redaktado de nia organo” neniu deziras la parolon.

Proponoj 8a, 8b kaj 8c estas sendiskute akceptataj. Se en la estonto ni tamen devos plialtigi la kotizon, la ĉefestraro publikigos la koncernen proponon jam frue, por ke la sekcioj povu konsideri ĝin ĉe la pretigo de la budĝeto.

Koncerne la proponon de sekcio Hago s-ro Blokker rimarkigas, ke eĉ se oni ĝin akceptus, la malfacilaĵoj restus la samaj. Ofte pri malfrua pago kulpas la kasistoj, kiuj ne tuj en la komenco de la nova duon-aŭ kvaronjaro enkasigas la kotizojn. Pro administraj kaŭzoj ni lasu la aferon kia ĝi estas. Sekvas mallonga diskuto, kiun partoprenas s-ro P. Moen (Hago), s-ro P. M. Mabesoone kaj s-ro A. J. Kalma. S-ro J. Telling (R'dam-Merkurio) rimarkigas, ke prefere la sekcioj suferu etan perdon ol la centra kaso grandan. Li estas kontraŭ la propono de Hago. La propono estas malakceptata per 29 kontraŭ 6 voĉoj.

La budĝeto sendiskute estas fiksata, kia ĝi aperis en la aprila numero.

S-ro H. J. Blokker kontraŭas la proponon de Groningen pri monopoligo de „oficialaj” eldonistoj. La lristoj neniam riskos aĉeti stokon, do la propaganda valoro estos nula; krome pluraj naciaj kaj internaciaj Esperanto-asocioj mem eldonas verkojn kaj ne povas malhavi la profiton. Ni estu dankaj, ke pluraj asocioj volas riski eldonadon: multaj „oficialaj” eldonistoj certe rifuzus. S-ro S. Pragan rimarkigas, ke ĉi tiun aferon oni ne konsideru laŭ „provinca” starpunkto. Li estas kontraŭ la propono de Groningen, kiu estas malakceptata per 33 kontraŭ 2 voĉoj. Propono 11b de Groningen estas sendiskute akceptata. Koncerne proponon 11c s-ro H. J. Blokker klarigas la aferon pri la ŝildoj, kiuj siatempe pendis en la stacidomoj. S-ro P. Moen subtenas la proponon. S-ino A. M. v. d. Wal-Brethouwer (Arnhem) konstatas, ke la cirkulero de s-ro Bakker fakte atingis la delegitojn tro malfrue. S-ro Kalma rimarkigas, ke se oni ne mendos kolektive, la kostoj fariĝos tro altaj. S-ro Blokker proponas ke oni informiĝu pri la prezo kaj poste kontaktu kun la ĉefestraro. Lia propono estas akceptata. Pri punkto 11d s-ro H. J. Blokker diras, ke laŭ la ĉefestraro mem intima kontakto kun la gvidanto de la propaganda servo estas dezirinda. Groningen reprenas sian proponon post certigo de la prezidanto, ke la ĉefestraro invitos s-ron Bakker de tempo al tempo ĉestiti la kunvenojn de la ĉefestraro. Propono 11e de Groningen estas akceptata.

(finota)

MEDEDELINGEN BUREAU: ESPERANTO BIJ HET ONDERWIJS

In het schooljaar 1950-51 werd naar door ons ontvangen mededelingen, in ons land Esperanto-onderricht gegeven in 20 scholen aan totaal 566 leerlingen. Helaas moeten we constateren, dat in vergelijking met het vorige jaar beide aantallen zijn teruggelopen. Verheugend is de vermeerdering van het aantal kweekscholen met één, nu totaal zes, terwijl ook het aantal leerlingen daar aanzienlijk is gestegen, n.l. tot een totaal van 221. Deze meetellend komen we dus tot in totaal 26 scholen en 787 leerlingen.

De scholen zijn van verschillende richting; 16 behoren tot het openbare, 4 tot het R.K., 3 tot het Prot. Chr., één Ned. Herv. en één tot het neutraal onderwijs. Ook aan het Blindeninstituut te Huizen wordt Esperanto onderwezen.

Wat de soort betreft: er zijn 3 ULO-scholen bij, één V.G.L.O.-school, 2 lycea, één M.T.S. en één ambachtschool. De overige zijn lagere scholen. De leeftijd van de leerlingen varieert dan ook van 10 tot 25 jaar.

Vier scholen melden, dat het E.-onderwijs daar verplicht is. Aan de an-

dere wordt het gegeven in cursussen buiten de normale schooluren, een enkele keer facultatief doch in de gewone schooltijden.

Behalve van de bekende kweekscholen ontvingen we bericht uit de volgende plaatsen: Alkmaar, Amersfoort, Amsterdam, Apeldoorn, Bergen-op-Zoom, Deventer, Edam, Enschede, Groet, Den Haag, Hilversum, Huizen, Leiden, Ruischerbrug, Utrecht en Venlo.

Naar aanleiding van daartoe ontvangen verzoeken hebben we besloten, ook leerlingen van kweekscholen voor onderwijzers in de gelegenheid te stellen, van onze cursus in Kerk-Avezaath te profiteren, natuurlijk voor zover er nog plaatsen beschikbaar zullen zijn. Gegadigden raden we aan, onmiddellijk een prospectus aan te vragen en zich daarna dadelijk op te geven.

De bekende gymnastiek-paedagoog Einar Blomberg uit Göteborg zal zorgen, dat we fit blijven en Zweedse volksspelen onderwijzen.

Bureau „Esperanto bij het Onderwijs” C. Krusemanstr. 43, Amsterdam-Z. 1.

Flandra Ligo Esperantista.

Postbus 342, Brussel.

Sekretario: G. Maertens, Prins Leopoldstraat 51, Sint-Kruis.
U.E.A. peranto: Dr. F. Couwenberg, Koninginnelaan 14, Blankenberge P.C. 4161.35.
Redakcio F.E.: Dr. T. van Gindertaelen, Louisastr. 23, Mechelen.

PROPAGANDA KASO

La ĉef-estraro decidis, en sia lasta kunsido, starigi propagandan kason, per kiu eblos plivastigi la agadon de la Ligo kaj atingi pli da personoj, Esperantistoj aŭ ne. Komprenoble vi plu varbu membrojn, fariĝu mem membro-subtenanto, kaj, se la cirkonstancoj

permesas tion al vi — tio ja ne estas malfacila! —, havigu sum(et)on por la propaganda kaso. Imitu la bonan ekzemplon de jam kelkaj! *Unuaj kontribuoj.*

D.B.	1.000.—
Anonima	100.—
Onklino Jet.	100.—

PLAATSELIJK NIEUWS

Bussum: En Bussum naskiĝis la 20-an de majo nova sekcio de L.E.E.N., grandparte konsistanta el kursanoj de s-ro H. J. Hendriksen Jr. Kiel reprezentantoj de la ĉefestraro ĉestis f-ino S. Visser kaj s-ro A. J. Kalma. Koran bonvenon al la novaj geanoj!

Den Haag: S-ino C. Conterno Guglielminetti, vic-prezidantino de Itala Esp. Federacio faros lumbildprelegon pri Italujo dimanĉon 10-an de junio vespere 8-a horo en kunveno Molenstraat 63. 7/6 Pritrakto de la hejmtasko. 14/6 diskuto pri la temo: „Ĉu la homa prudento estas beno aŭ malbeno por la homaro?” 21/6 Pritrakto de la lingvo Esperanto. 28/6 Pritrakto de la hejmtasko. 5/7 Pritrakto de hejmtasko. 12/7 Pritrakto de la temo: „Bona kaj malbona propagando por Esperanto”. 19/7 Sezonia festvespero.

Deventer: Nia sekcio invitis la kursanojn de Instituto por Popolklerigado ĉestiti ĝian kunvenon. Oni montri lumbildojn pri la sekigo de la Suda Maro, prezentis teatraĵeton kaj kune kantis. La prezidanto instigis la kursanojn daŭrigi la studon kaj aliĝi al la sekcio.

Groningen: 7-VI Prelego de s-ro K. Reddingius. 14-VI S-ro H. Niemeijer rakontas pri la salindustrio. 21-VI S-ro J. H. Teunissen parolos pri sia laboro. 28-VI S-ro H. Niezen parolos pri sia laboro.

S-ro Holmes, la prezidanto de Londona Esperanto-Klubo kiu kun sia ed-

zino vizitis nian kongreson, restis ankoraŭ dum du semajnoj en Nederlando. Jaŭdon la 24-an de majo li parolis por la anoj de nia haga sekcio pri spiritismo kaj vendredon la 25-an de majo li estis la gasto de nia sekcio en Leeuwarden.

V.E.B. Afdeling Gent: Onze rangen werden versterkt door enkele nieuwe leden welke de cursus, gegeven door de Heer De Boes, met succes hadden beëindigd. Einde April werd het programma van de maand Mei vastgesteld als volgt: 2 Mei: Voordracht door de Heer De Boes over „Bagatelajoj”. 9 Mei, ontspanningsavond. 16 Mei: het Beneluxkongres. 23 Mei: debatavond ingeleid door de Heer E. Lödör; onderwerp „Voor of tegen het roken en snoepen”. 30 Mei: Vervolmakingscursus door de Heer Mortelmans.

Onze programma's werden zodanig opgesteld dat iedereen de gelegenheid krijgt tot spreken en zich dus kan bekwamen in het gebruik van Esperanto.

Al ges-roj Van Halter, Pres. Rooseveltlaan 64, Gent, naskiĝis la 1.4.51, filineto *Sonja*. Al ili niajn korajn gratulojn kaj ĉiajn sanon kaj prosperon al la infaneto!

V.E.B. Afdeling Mechelen: Zeven onzer leden namen deel aan het Congres te Hilversum, dat meeviel en de samenwerking LEEN -FLLE bewees. Ons programma voor Juni is als volgt: 6/6: Spreekoefeningen; 13/6: Enigmo; 20/6: Gramatiko; Someraj Kursoj; 27/6: Prelego.

AL MÜNCHEN

La karavano al la U.E.A.-kongreso en München gvidos s-ro W. Böttcher, P. C. Hooftstr. 25, Leeuwarden.

Ankaŭ se vi ne partoprenas en la karavano, vi tamen sendu la aliĝilon, mendilojn kaj pagon al li.

Kongreskotizo g. 22,—. Tranoktado de g. 5,— ĝis g. 15,30 por unu nokto; en amasrestadejo g. 4,50 por la tuta semajno. Komunua manĝado estas tre malmultekosta (g. 6,75 por 9 varmaj manĝoj).

La karavano forveturos el Nederlando laŭ la Rejno jaŭdon la 2-an de aŭg. kaj reveturos tra la Bavariaj Alpoj, Nigra Arbaro, Sarteritorio kaj Luksemburgo. Reveno en Nederlando merkredon la 15-an de aŭg. Kostoj proks. g. 85,— ekskluzive de tranoktoj kaj manĝoj sed inkluzive de postkongresa ekskurso al Garmisch-Partenkirchen je 12-8-51. Partoprenos en la karavano anĝloj, belgoj kaj nederlandanoj. Aliĝu plej rapide, sed nepre antaŭ la 15-a de junio!

ESPERANTO KAJ SCIENCO

Aperis la unua numero de „La Studento”, nova internacia organo, kiu raportas pri studentaj kaj universitataj cirkonstancoj ĉie en la mondo kaj informas pri internacia studenta kunlaboro, internaciaj kongresoj kaj konferencoj. „La Studento” recenzos sciencajn eldonaĵojn kaj estos la forumo de tutmondaj esperantistaj studentoj. Provizore ĝi aperos 6-foje en jaro. Abonprezo 1 dolaro.

Sekcioj, abonu la novan gazeton por la legejoj de studentaj hejmoj kaj petu prospekton ĉe la peranto A. Dekker, Hembrugstr. 7, I, Amsterdam-C.

La 25-an de aprilo doktorigis en la stata universitato en Leiden s-ro C. P. S. van Oosten, profesoro pri matematiko ĉe „St. Thomascollege” en Venlo. Lia disertacio, kvankam komprenbla nur por fakuloj, meritas specialan atenton, ĉar li aldonis al ĝi esperantlingvan resumon. Sed ne nur pro tiu resumo la verko estas atentinda por esperantistoj. El la 10 tezoj de s-ro C. P. S. v. Oosten du koncernas la interlingvistikon. La kvina tezo tekstas: La klopodoj de Peano (mondfama itala matematikisto kaj aŭtoro de la projekto „Latino sine flexione”) por apliki universalan planlingvon en la scienco ne renkontis tiom da atento, kiom ĝi meritis. Estas evidente, ke s-ro van Oosten menciis tiun Peano ne por propagandi „Latino sine flexione”, kiu tute ne plu ekzistas, sed por atentigi la matematikistojn pri tio, ke unu el la plej konataj samfakuloj estis entuziasma adepto de la ideo pri konstruita helplingvo. La oka tezo tekstas: „Estas preferinde, ke tradukante matematikajn terminojn en planlingvon oni uzu la ekzistantan internacian terminaron”. Kvankam la tezo ne mencias Esperanton, la nura fakto, ke la aŭtoro aldonis al sia verko esperantlingvan resumon jam montras, kiun lingvon li speciale celis. Se Esperanto iam fariĝos la oficiala lingvo de la scienco ĝi tion dankos ne al la teoriuloj sed al praktikuloj kiel s-ro van Oosten, kiuj ne atendis la oficialigon, sed kuraĝe manifestis sian kredon en la estonta venko de Esperanto.

La somera numero de nia organo aperos meze de julio. Manuskriptoj atingu la red. antaŭ la 1-VII.

NIAJ ESPERANTO-ENIGMOJ KUN PREMIOJ.


PREMION akiris por VEB, post n-roj 105-106: f-ino Van Mullem, el Blankenberge, kaj por LEEN: f-ino L. M. Nederkoorn, el Doetinchem.

SOLVO de n-ro 107: *Horiz.* 1. kukum; amput. 2. urs. 3. humor/humor; ornam. 4. dec. 5. lango; imito. 7. gras; germ. 8. puŝ. 9. angil; adapt. 10. unu. 11. nulig; metio.

Vert. 1. kabel; grajn. 2. akr. 3. kamen; angul. 4. gis. 5. murdo; plug. 6. gru. 7. asoci; ŝaum. 8. muĝ. 9. pensi; elast. 10. tur. 11. tombo; metro.

NOTU: En n-ro 108 bedaŭrinde enŝovigis eraro: la 10-a vortparo estu „kara horo”. Solvo akceptata ĝis 20/VI/51.

N-ro 109: KRUCVORTENIGMO.



Horizontale. 2. li perdis sian liberecon pro milito(R). 4. fari, ke la mal-

sameco de du objektoj pli klare montriĝu. 6. apenaŭ pli varma ol nia korpo. 7. komenci(R); plenda ekkrio(R); 8. efektive aŭ ŝajne ebena parto, el kiu io elreliefiĝas(R); vivanta estaĵo; senti surprizon pro io stranga(R). 10. dura da veturilo(R).

Vertikale. 1. precipe(R). 2. senvaloraĵo(R); subtenilo de konstruaĵo(R). 4. ĝi deturnas la spiriton de ĝiaj prizorgoj(R); puŝi ion, glitigante ĝin(R). 6. malmilda; ne plenumi la volon de iu kiu rajtas postuli tiun plenumon(R). 8. manĝemo; kvalito. 10. tajloro uzas ĝin(R); alkoholaĵo(R). 11. frukto(R).

N-ro 110: SALTANTE

kiel la ĉevaleto el la ŝako, vi trovos du proverbojn.

t e i e a o s s
f o j n t l r t
f a K e a u a o
i a n b g t e e
o l s s ŝ l r t
a o k u o a n b
o t r e o o j o
n z l i a n m n

La solvojn sendu la nederlandanoj al S-ro G. J. Teunissen, Burg. Tallegenstr. 21 hs., Amsterdam-Z., kaj Flandra Ligo al Postbus 342 (Enigmoj), Brussel, antaŭ la 20-VI-'51.

GRAVECO DE TURISMAJ ESPERANTLINGVAJ ELDONOJ

De tempo al tempo oni legas ke iu urbo eldonis Esperantlingvan turisman faldfolion aŭ broŝureton. Ĝenerale tio estas la rezulto de ofte longdaŭraj klopodoj de lokaj gesamideanoj. Tial multaj aliaj gesamideanoj ne volas fari tiujn klopodojn kiujn ili juĝas vanaj kaj eble senrezultaj. Estas pro tio ke mi volas tie-ĉi komuniki al vi miajn spertojn.

Okaze de la kongreso de Flandra Ligo Esperantista en Brugge en 1938, la tiea sekcio „Paco kaj Justeco” klopodis por konvinki la urbestaron pri eldono en Esperanto de propagandmaterialo pri Brugge. Kompreneble la urbestro estis skeptika. Post niaj reaj insistoj kaj argumentadoj, ĝi cedis kaj la eldono aperis en 1939. Tuj la sukceso estis grandega. Venis petoj ankaŭ el plej malproksimaj lokoj. Tio faris grandan impreson. Post la milito la urbo devis reeldoni propagandajn en diversaj lingvoj. Kaj starigis la demando ĉu ankaŭ okazos reeldono de la Esperantlingva prospekto. Kelkaj de la turisma oficejo opiniis ke tia eldono estas propagando por Esperanto. Ni kontraŭargumentis ke tio estas efektive vera sed ke ĝi estas ankaŭ io alia. Ĝi estas samtempe ankaŭ propagando por Brugge. Tiun vidpunkton ili akceptis kaj do denove ni havis propagandfolion en nia lingvo. Kaj denove la sukceso estis grandega. Ankaŭ nuntempe preskaŭ ĉiutage alvenas iu informpeto en Esperanto; ofte eĉ 4 aŭ 5 en unu tago. La estro de la turisma oficejo sekve deklaris al mi ke li estas nun plene konvinkita - ne jam pri la fina, ĝenerala

oficialigo de Esperanto - sed certe pri la propaganda valoro de ĝi. Laŭ li, Brugge atingis tiamaniere publikon kiun ĝi alie ne atingus.

Tiurilate ankaŭ io alia. Nia U.E.A. bezonas monon. La tuta movado fakte bezonas multe da ĝi. Unu el la multaj rimedoj estas la anoncoj en la jarlibro de U.E.A. ŝajnas al mi ke la delegitoj ne sufiĉe ekspluatas tion. La anoncoj estas ja tre malaltaj. Do mi iris al la turisma oficejestro. Mi aŭdis de li ke la urbestro estas en la vera senco de la vorto tiel superŝutita per la ĉiutagaj, multegaj demandoj de plej diversaj gazetoj, revuoj, firmoj k.t.p. por propagandaj anoncoj, ke en la plej multaj kazoj ĝi eĉ ne plu konsideras ilin. Sed, konvinkita pro la sukceso de la Esperanta faldfolio, li promesis tamen subteni mian peton. La rezultato: la urbestro mendis tutpaĝan anoncon en la U.E.A. jarlibro 1951.

Ni poste iris al kelkaj hoteloj por rakonti niajn kaj la urbestrajn spertojn pri la valoro de Esperanto por anoncoj. Tri el ili kaj unu ekspluatanto de motorboatoj sekve mendis malpli spacan anoncon en la jarlibro por 1951.

Ni nun esperas ke la gesamideanoj estos konsekvencaj. Ili plu postulu la Esperantlingvajn propagandajn kaj ili subtenu nur tiujn entreprenojn kiuj anoncas ĉe ni. Tiam ni povos daŭre fari interesan laboron kaj registri rezultatojn.

drs. Fernand Roose.
delegito de U.E.A.

BIBLIOGRAFIO

Recenzoj pri de ni ricevitaj verkoj aperas samtempe en „Nederlanda Esperantisto”, organo de la Nederlanda Esperanto-Asocio „La Estonto Estas Nia” kaj en „Flandra Esperantisto”, organo de „Flandra Ligo Esperantista”. Pro tio ni aperigas recenzojn nur pri tiuj verkoj, kiujn ambaŭ asocioj ricevis. Librojn, ricevitajn de unu el ambaŭ asocioj, ni nur mencias.

L. Bastien, *Naŭlingva Etimologia Leksikono*, eld. The Esperanto Publishing Cy Ltd, Anglujo, 1950, 317 p.

Thor Heyerdahl, *Ekspedicio KON-TIKI*, el la norvega trad. de C. Brynildsen kaj lingve prilaborita de S. Engholm, eld. Eldona Societo Esperanto, Stockholm, 1951, 208 p. + 28 paĝoj da fotoilustraĵoj. (sv. kr. 16,75).

J.E. Rodo, *Ariel*, el la hispana trad. M.F. Menendez, eld. Urugvajja Esperanto-Societo, Montevideo, 1950, 158 p.

Deklaro pri principaro de la socialista partio en Granda Britujo, dupaĝa folieto, senpage havebla ĉe Socialist Party of Great Britain, 52 High st., Clapham, London S.W. 4.

Gvidfolio ilustrita pri „Lago de Como”, senpage havebla ĉe „Ente Provinciale Turismo”, Como (Italujo).

Partoprenu antaŭ München la INTERNACIAN FERIO-SEMAJNON, 28.7-4.8.1951 en KONSTANZ, Germanujo. Vizitoj al Aŭstrujo kaj Svislando. Internacia Ĉe-kurso de T. Morariu. Alig-limo: 1.7. Petu tuj la ilustritan programon kun bildprospekto de: IFS Esperanto, Konstanz, Grüngang 2, Germanujo.

SIGNO:

TRI RUĜAJ ROZOJ

T. Schwed

Ferdinando tuj mallevis la gazeton, kiam la juna knabino entramiĝis. Ho, kiel ĉarma estis la junulino! Sur la blondaj bukloj gaje sidis ĉapeleto, tiel aŭdace surmetita, ke ĝi plej ĝuste efikis. Si havis malhelbluajn okulojn, ĉarman vizaĝon kaj akre ŝminkitan allogan buŝeton. Kaj la figuro? Ho, eĉ la kostumo estis eleganta! Per unu vorto, ŝi estis knabino laŭ deziro.

Ferdinando deziris nun alproksimiĝi al la belulino. Li provis ĉiel vekti ŝian atenton, sed pli vere — kiel nun ĉiuj knabinoj en la tramo — ŝi sin okupadis nur pri sia mansaketo. Ferdinando kiel kulturo, serĉis okazon por alparoli la ĉarman virineton. Kompreneble, ŝi rimarkis lin jam de longe; sed ŝi komete hezitis, ĝis fine ŝi decidis aljeti

ĈU ESPERANTO TAŬGAS POR LITERATURO?

L. DE BEAUFRONT

Laŭ juĝoj de kelkaj homoj, la lingvo internacia devas modeste limigi siajn pretendojn kaj rolon en la ĉiutagaj bezonoj plej ordinara kaj plej simplaj. Trovi sian vojon aŭ loĝejon en vojaĝo, ordoni pri siaj manĝadoj, fari la signifajn aĉetaĵojn, viziti facile la vidindaĵojn de la lando, kiun oni trairas: jen estas ĉio, kion de ĝi atendas, koncerne la rilatojn internaciajn, la personoj, pri kiuj ni parolas. Certe, eĉ malgrandigita ĝis tia minimumo, la rolo de l'organo estus ankaŭ vasta kaj ĝia utileco absolute nediskutebla.

Aliaj homoj iras pli malproksimen en siaj postuloj; ĉar al tiu programo ili aldonas la tutan kampon komercan en la korespondado, interŝanĝoj, interkontraktoj, k.t.p. Laŭ ilia opinio, la lingvo povas ankaŭ atingi tiun ŝtupon; sed ĝi ne devas altiĝi pli alte. Ne juĝante ilian komprenon, ni rapidu konstati, ke ĝi malfermas al la lingvo agadan kampon multe pli vastan kaj fakte konfesas pri ĝi utilecon pli grandan.

Tria kategorio rajte pretendas, ke la lingvo internacia devas iri pli malproksimen ankaŭ kaj servi plene por la scienco internacia. Sed, diras kelkaj el tiuj, kiuj ĝin formas, tia lingvo ne devas tuŝi la kampon de la literaturo ĝuste nomita; ĝi ne estas farita por tio ĉi. Eĉ trovigis skizantoj de lingvo internacia por akcepti tiun ĉi opinionon kaj nin proklami ridindaj, ĉar ni juĝas alie pri tio. Cetere ni konfesas, ke nia opinio koncernas nur la lingvon internacian tiel verkitan, kiel ĝi devas esti kaj ne la skizon aŭ pasticon, kiun ili proponis sub ĝia nomo.

Jes, ni tion ĉi diris kaj ĝin ripetas, ĉar la lingvo internacia celas homojn civilizitajn, ĝi devas prezenti ĉiujn rimedojn de niaj lingvoj. Ĝi taŭgas por nenio, se ĝi ne taŭgas por ĉio. Sed ĉar la lingvo de popolo civilizita estas necese literatura, la lingvo internacia devas havi la kapablon esti tia.

Ni klarigu nian penson:

En la realeco, idiomo ne dividigas je diversaj partoj precize distingeblaj kaj por tiel diri apudmetitaj. Ni ne trovas en ĝi sur unu flanko la lingvon ordinaran kaj sur la alia la lingvon komercan, tie ĉi la lingvon sciencan, kaj tie la lingvon literaturan sen komunaj formoj, sen komuna proprajo. La klasigo farata de la adjektivoj ordinara, komerca, sciencia, literatura, koncernas nur malgrandan nombron da vortoj, da esprimoj kaj arandoj speciale difinitaj por tiu aŭ alia apartenaĵo. Ekzemple, vi eble ne trovos cent vortojn, aŭ esprimojn propre apartenantajn al tio, kion oni nomas komunkonsente la lingvo komerca: kaj ĉia scienco posedas, ekster la proprajo komuna de la lingvo, nur tre malgrandan terminaron. Aliflanke ĉu ekzistas tiel forta diferenco inter la lingvaĵo ordinara kaj la lingvaĵo literatura? Se ni esceptas kelke da vortoj, precipe da vortarangoj rezervitaj por la dua, ĉu ni ne retrovas en ĝi la tutan proprajon de l'unua? Ni facile povus citi, se ni havus por tio tempon kaj lokon, multe da paĝoj, kaj da paĝoj juĝataj alte literaturaj, kiuj tamen ne prezentus eble dek vortojn ne ĉiutage uzatajn en la lingvo komuna kaj ordinara.

Sekve, kaj al tio ĉi ni volas veni, se la lingvo internacia posedas la klarecon, precizecon kaj flekseblecon necesajn por la bona esprimado de niaj bezonoj kaj ideoj en la apartenaĵo de l'

vivo ĉiutage, ĝi devos nur tre malmulte peni por kontentigi la postulojn de l'apartenajo literatura, kiu estas multe malpli speciala ol oni inkliniĝas kredi. Tial ni ne povas kompreni l'aŭtoron de projekto de lingvo internacia, kiu neas mem en sia verko ĉiun econ literaturan kaj tamen pretendas havi la gloron, ke li donos al la mondo verkon multe superantan Esperanton. Ni ankaŭ malpli komprenas tiujn, kiuj malfermas ĉiujn kampojn al la lingvo internacia kaj trovas, ke Esperanto estas bonega por ili, sed kiuj timas vidi ĝin penetri en la kampon literaturan.

Riĉeco, precizeco, fleksebleco estas por ĉiu lingvo la tri grandaj farantoj de bona literaturo. Sed, kiu ajn, kiu serioze ekzamenis Esperanton, povas nei, ke la lingvo aldonas tiujn ĉi tri ecojn, kaj en tre alta grado, al la ekstrema facileco ĝin karakterizanta? Kiel ĝi en tia kondiĉo do povus ne taŭgi por la literaturo?

Per sia riĉeco kaj sia fleksebleco, ĝi liveras facile la vorton necesan kaj evitas la ĉirkaŭfrazojn, la neklarajn arandojn; per sia precizeco, ĝi donas la ĝustan vorton kaj tiel esprimas la ideon en ĝiaj tutaj verco kaj forteco. Ĉu en tio ne trovigas mirindaj rimedoj por la kampo literatura? En tiu rilato Esperanto certe povas esti kalkulata inter la lingvoj plej riĉe donacitaj. Kaj ni ne trograndigas dirante tion ĉi.

La personoj, kiuj dubas pri tiu ĉi punkto, estas ordinare trompataj de la fakto, ke ili sin apogas sur sian patran lingvon, en la juĝo kiun ili formulas koncerne Esperanton pri la demando literatura. Ili komparas du vortojn, du esprimojn, kaj pro tio, ke Esperanto ŝajnas al ili esti en malsupereco pri imago aŭ forteco, en tiu speciala okazo, ili konklude aljuĝas al ĝi malsuperecon ĝeneralan en la kampo literatura. Ili ne pensas, ke ili povus fari konkludon identan pri lingvo tre ŝatata en la rilato literatura, se ili entreprenus la saman komparon en tiu lingvo. Ili ne diras al si ankaŭ, ke en multego da aliaj okazoj, ili estus devigitaj konfesi nepridiskuteblan superecon en Esperanto, pri la imago, la precizeco, la forteco aŭ la delikateco de l'nuanco, se ili metas la komparon sur aliajn terminojn aŭ frazojn.

(finota)

LA ĈASO

Jo Spierenburg.

*La cervoido - laca - jetas sin
Sur la genuojn kaj ĝemegas,
Ĉar ĉiam la pafil' forpelis ĝin,
Okuloj rompiĝantaj jam, petegas.*

*La hundoj proksimiĝas pli kaj pli
Rifuĝi ... vane por la besto!
De kie venas helpo nun al ĝi?
Ĝi devas morti sen ies ĉeesto.*

*Kaj proksimiĝas pli kaj pli la hundoj,
Kaj malfortiĝas de la id' la kor':
Cerveto atingita! Sed sen vundoj
Ĝi mortas en la sama hor'.*

trad. M.E. Nawijn.

INTERNACIA RENKONTIĜO

okazos 22-28 VII en Skövde (Sved.). Informojn donas Skövde Esperanto-Klubb, Björkvägen 7, Skövde, Sved.

al li rigardon. Malrapide, li alserpentumis al ŝi; sed ĉe tio li forĝesis, ke veturanta tramo havas siajn maliciojn, ĉar en tiu momento li staris iomete malfirme sur siaj piedoj, kiam la tramo traveturis kurbigon. Kaj, antaŭ ol li povis firme stari, li puŝis per sia kubo la vitron. La vitro krakis kaj la pecoj falis teren; kelkaj virinaj voĉoj ekkriegis, viro malbenis, la konduktoro venis tra la veturilo kaj Ferdinando, per unu salto, estis jam sur la strato antaŭ ol la konduktoro povis kapti lin kaj malaperis malantaŭ proksima angulo.

Ferdinando restis do tre ĉagrenita, ĉar estas dolorige konstati, ke aventuro finiĝas antaŭ ol ĝi komenciĝis. La sekvan tagon, ĉagrenite li sidis en kafejo; kaj tute senpense li foliumis gazeton. Nu, jen kio troviĝis tie en la anoncparto:

„La interesa juna viro, kiu hieraŭ, en la tramo, linio A, ĉe la provo alproksimiĝi malbonsancis, estas invitata al renkonto:

Zamenhof-monumento, je la sepa Signo: Tri ruĝaj rozoj”.

La koro de Ferdinando ĝojkriis. Ĉu je la sepa? Ankaŭ do li havas tem-

pon! Jen, rapide hejmen por surmeti la plej bonan veston kaj eĉ pli rapide prizorgi tri belajn ruĝajn rozojn kaj bombonojn. Kaj poste, rapidpaŝe, li iris al la monumento, antaŭ kiu jam okazis aliaj centmil romantikaj rendevuoj.

Si ankaŭ ne estis tie, sed du kolasaj tramistoj ĝentile proksimiĝis. Unu el ili kviete ridetis dum la alia prezentis du fakturojn: dek guldenojn pro rompita vitro; kvin guldenojn kaj duonon pro anonco. Ferdinando rigardis ilin ambaŭ; ankaŭ neniam li vidis tiel grandegajn tramistojn. Li jetis la rozojn sur la pavimon kaj elpoviĝis sian monujon ...

Sed unu aferon li tre bone scias: neniam plu anonco venigos lin al rendevuo!

trad. K. Michalichka
el: „La Distro” - Aŭstrujo

Verantw. uitgever: Vlaamse Esperantisten-Bond Postbus 342 - Brussel en Ned. Esperantisten-Vereniging LEEN, Stadionkade 6 Amsterdam Z. (Ned.)

Drukkerij Krol, Hoofdstraat 31, Uithuizen (Ned.)